



Bahaa Esperanto-Ligo

<http://www.bahai.de/bahaaeligo/>
<bahaaeligo@bahai.de>

T +49-(0)6192-9929-16, F +49-(0)6192-9929-99

BEL Eppsteiner Str. 89 DE-65719 Hofheim-L'hain Germanio

iniciatita en 1972 kaj fondita en 1973 kun
aprobo de la UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO

kunlaboranta kiel faka asocio kun
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ek de 1975
(UEA-kodo: BELX-U)

*"...La tago alproksimiĝas kiam ĉiuj popoloj
de la mondo akceptos universalan lingvon
kaj komunan skribon."*

Bahá'u'lláh

Eminentuloj postulas de AĤMADINEĴAD religian liberecon por bahaanoj

Germanio, 2006-06-25

Jam kelkajn tagojn antaŭ la komenciĝo de la monda futbala ĉampionado en Germanio pluraj eminentuloj per malferma letero turnis sin al la prezidento de Irano, Mahmud AĤMADINEĴAD, kiu konsideris partopreni maĉon de la irana teamo. Ili postulis ke li garantiu al la minoritatoj en Irano kaj precipe al la bahaanoj la religiajn kaj homajn rajtojn. La letero i.a. diras: „Ne estas memkomprenebla rajto partopreni en tiu ĉi internacia sporta konkurso. Ĝi okazas en kadro de reciproka respekto kaj observado de reguloj. En via lando dume la rajtoj de tutaj popolgrupoj estas komplete malrespektataj.”

La irana reĝimo sisteme malebligas al bahaanoj, kiuj formas kun 300.000 anoj la plej grandan religian minoritaton de la lando, praktiki sian religion. La 20an de marto 2006 la Speciala Raportantino pri Religia Libereco ĉe UNO, Asma ĴAHANGIR, esprimis sian grandan zorgon pro la situacio de la bahaanoj en Irano. Ŝi sciigis ke ŝi eksciis pri sekreta letero de la irana armeestro direktita al la informa ministerio, la revoluciaj gvardioj kaj la polico. Laŭ tiu letero la plej alta ŝtata gvidanto, ajatolo KAMENEI dekretis identigi ĉiujn bahaanojn, observi iliajn aktivecojn kaj sekrete kolekti ĉiajn informojn pri ili. Antaŭ kelkaj jaroj konatiĝis simila sekreta letero kiu enhavis planon por la sistema estingo de la bahaa komunumo.

La lastatempa rea akriĝo de la situacio de la bahaanoj en Irano kaj la akuta minaco kiun ili frontas tie dum la lastaj monatoj evidentiĝis inter alie fia agita kampanjo kontraŭ ili en iranaj gazetoj. Krome la irana komerca ĉambro starigis listojn pri la laborpostenoj de bahaanoj. Kaj en majo en la sudirana urbo Ŝiraz' 54 plejparte junulaj bahaanoj estis senkiale arestitaj. Post kelkaj tagoj la plej multaj estis liberigitaj kontraŭ altaj kaŭcioj same kiel multaj aliaj dum la lastaj monatoj.

La malferma letero estas publikigita en la interreto kaj subskribita intertempe jam de centoj (www.wm-iran-offenerbrief.de). En Germanio pluraj gazetoj raportis pri tiu ĉi iniciato. Dume ankaŭ en multaj aliaj landoj la amaskumunikiloj raportas pri la netolereblaj evoluoj en Irano.

Pliaj informoj:

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL), bahaaeligo@bahai.de